LA EVANGELIO

Se oni demandus “Kio estas la evangelio?” inter grupo da homoj, probable ili diverse respondos ĉar malmultaj havas klaran ideon pri tiu grava temo. La preciza signifo de la greka vorto estas ‘bona novaĵo’, kaj necesas esplori kiel la Biblio uzas ĝin por eltrovi kiel kompreni ĝin. Kian ‘bonan novaĵon’ Jesuo kaj la apostoloj anoncis?

Jesuo – parolis pri *‘la evangelio de la regno’* aŭ *‘la evangelio de Dio’* (Mt.4:23; 9:35; 24:14; Mk.1:14-15

- diris, ke Dio sendis lin por *‘bonanonci* (anonci la evangelion) *al malriĉuloj’* (Lk.4:8)
- ordonis al siaj disĉiploj, ke ili*’prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo en la tuta mondo’* (Mk.16:15)

Marko – nomis sian rakonton pri Jesuo *‘la evangelio de Jesuo Kristo, Filo de Dio’* (ĉ.1:1)

Paŭlo – skribis ofte pri *‘la evangelio de Dio’* aŭ *‘la evangelio de lia Filo’* (Rom.1:1,9; 19:9; 1Kor.9:12 ktp)

- klarigis, ke la evangelio:
    1. – estas savo por ĉiu, kiu kredas (Rom.1:16)
    2. – enlumigas la vivon kaj senmortecon (2Tim.1:10)
    3. – estas la vorto de la vero (Efes.1:13)
    4. – estis instruita al Paŭlo de Jesuo mem (Gal.1:11-12)
    5. – estis predikita al Abraham (Gal.3:8)
    6. – venis kun potenco kaj la Sankta Spirito (1Tes.1:5)
    7. – nepre devas esti predikita de Paŭlo (1Kor.9:16)

Paŭlo forte avertis – dufoje - kontraŭ iu alia evangelio (Gal.1:6-9). Ni lernas do ke, en la Biblio troviĝas **SOLE UNU EVANGELIO.** Ni esploru precize tion, kion Jesuo kaj la apostoloj predikis.

La unuaj vortoj de la predikado de Jesuo estis *‘Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝis’* (Mt.4:17) kaj kiam li elsendis siajn disĉiplojn por prediki, li instruis ilin anonci la saman mesaĝon: *‘... prediku , dirante: La regno de la ĉielo alproksimiĝis.’* (Mt.10:7). Multaj el liaj paraboloj temas pri la regno. Kiam la disĉiploj demandis kial li parolis per paraboloj, li klarigis: *‘Al vi estas donite scii la misterojn* (kaŝitaĵoj) *de la regno de la ĉielo, sed al ili ne estas donite.’* (Mt.13:10-11) Sekvas lia klarigo de la parabolo pri la semisto: *‘Kiam iu aŭdas la vorton de la regno ...’* (v.19) kaj poste Mateo rakontas pli da paraboloj, kiuj komencas: *‘la regno de la ĉielo similas al ...’* (v.24,31,33,44,45; ankaŭ Lk.13:18,20) Je la komenco de sia rakonto pri Jesuo al Teofilo Luko skribas, ke Jesuo, post sia releviĝo, parolis al la disĉiploj pri *‘la aferoj de la regno*

de Dio ...' (La Ag.1:3) En la preĝo, kiun Jesuo instruis al la disĉiploj aperas *'Venu via regno...'*

Estas evidente do, ke la ĉefa temo de la evangelio, kiun Jesuo predikis estas **LA REGNO DE DIO**, kaj estas rimarkinde, ke kvankam tiu regno estas io, por kiu ni devas preĝi, tamen tiuj paraboloj priskribas aferojn de la nuna vivo, ĉefe la serĉo por la 'trezoro'. Tial la evangelio, kiun Jesuo predikis temas pri ne nur la estonta regno sed ankaŭ la nuna tempo. Multo, kion li instruis temas pri kiel liaj sekvantoj devas konduti unu al alia, precipe instruante, ke la etoso de tiu regno devas esti tute malsimile ol tiu de la mondo:

"Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto; same kiel la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj." (Mt.20:25-28)

La Agoj temas pri kiel la apostoloj plenumis la komision prediki la evangelion al la tuta mondo. Kian mesaĝon ili elsendis?

Petro – la unua parolo de la nova kristana epoko, kiu troviĝas en La Agoj 2, devas esti tre grava, kaj certe estis ege efika ĉar pro tio ĉirkaŭ tri mil homoj baptiĝis.

Valoras listigi la punktojn, kiujn Petro diris al la aŭskultantoj:

1. – Jesuo estas viro de Dio
2. – per li Dio faris miraklojn
3. – li estis krucumita kaj mortigita laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio
4. – Dio lin levis el la morto
5. – li estos reĝo sur la trono de David laŭ la profetaĵoj en la Malnova Testamento
6. – li venkos siajn malamikojn
7. – Dio faris lin Sinjoro kaj Kristo (Mesio)
8. – tiuj, kiuj pentos kaj baptiĝos ricevos pardonon de pekoj

Tiu prelego, estante la unua, certe estas raportita sufiĉe plene kaj povas esti utila resumo de la evangelio. La sekvantaj similas, kvankam iom mallongigitaj:

La Agoj 3:12-26 – Dio gloris Jesuon, la Sanktulon kaj Justulon, la Estron de la vivo, kaj relevis lin.
- lia sufero estis laŭ la profetaĵoj
- tiuj, kiuj pentos kaj baptiĝos ricevos pardonon
- Jesuo revenos por beni ĉiujn gentojn

4:8-12 – Dio levis Jesuon

- en neniu alia krom li estas savo

5:30-33 – Dio levis Jesuon

- per li Izraelo ricevos pardonon

10:34-43 – homoj el ĉiuj nacioj povas esti akceptitaj de Dio

- paco venas per Jesuo
- li estis mortigita
- Dio levis lin
- li estas la juĝisto
- per lia nomo kredantoj ricevos pardonon

Filipo – La Agoj 8:4-13 – proklamis ... Kriston

:26-40 – Jesuo estas la Filo de Dio, mortigita laŭ la profetaĵo de Jesaja

Paŭlo – La Agoj 9:20 – Jesuo estas la Filo de Dio

13:16-41 – li estas Savanto, ido do David laŭ la profetaĵoj

- li estis mortigita
- Dio levis lin laŭ la profetaĵoj
- pardono venas per li

17:1-3 – Jesuo devis suferi kaj releviĝi

- li estas la Kristo (Mesio, kiu signifas ‘sanktoleito’ alivorte ‘reĝo’)

22-31 – Dio elektis viron por juĝi la mondon

- Dio relevis tiun viron el la mortintoj

19:8 – la regno de Dio

:10 – la vorto de la Sinjoro

:13 – Jesuo

26:6-23 – pardono por tiuj, kiuj fidas al Jesuo

- Kristo devis suferi
- li estos la unua reviviĝi el la mortintoj
- li proklamas lumon al la nacianoj

8:23-31 – **LA REGNO DE DIO**

- **LA AFEROJ PRI LA SINJORO JESUO KRISTO**

Jen resumo de la bona novaĵo, kiun Jesuo kaj liaj sekvantoj predikis. Kompreneble akcepto de tio postulas, ke niaj vivmaniero kaj pensmaniero akordu kun la instruo de Jesuo kaj la apostoloj. Ni ne ricevos pardonon se ni mem ne pardonas; ni ne vivos en la regno krom se ni amas tiujn, kiuj estos kun ni tie; ni ne povas esti civitanoj

de la regno krom se ni permesas al nia reĝo vivi nun en niaj koroj tiel, ke ni amas kiel li amas.

Ĝis la reveno de nia reĝo li povas paroli nur pere de niaj vortoj; niaj devas esti la piedoj, kiuj eliras por venigi la evangelion al la popoloj; niaj devas esti la manoj, kiuj servas la bezonulojn; niaj devas esti la okuloj, kiuj montras kompaton al la suferantoj; niaj la vizaĝoj, kiuj lumigas la malĝojulojn per niaj amantaj ridetoj respegulantaj nian ĝojon en Jesuo.

“Kiel ĉarmaj estas sur la montoj la piedoj de anoncanto, kiu proklamas pacon, anoncas bonon, sciigas pri helpo, diras al Cion: Regas via Dio!” (Jes.52:7)